

Joseph M. Scriven ,  
Trans imag' Jesu'  
amikas

*tradukita de Reinhard  
Pflüger*

Trans imag' Jesu' amikas -  
kia la privilegi',  
ke li portas nian ŝuldon.  
Preĝe donu ĝin al li.  
Kiom ni disipas ŝancojn  
pri anima harmoni',  
sole ĉar ni rezignadas  
preĝe turni nin al li.

En danĝero kaj aflikto,  
tento kaj eĉ tragedi'  
ni neniam malesperu.  
Preĝe prenu ĝin al li,  
la fidela akompano.  
Amikec' ne eblas pli.  
Konas li malforton ĉian,  
preĝe portu ĝin al li.

Zorgoŝarĝo ofte pezas,  
kaj senfina la defi'.  
Ĉion la Savant' superas.  
Preĝe fuĝu ni al li.  
Se fortunatas sin amikoj,  
preĝe diru ĝin al li.  
Vin konsole ĉirkaŭbrakos  
la Unika sen kopi'.

Vi, Savant', promesis porti  
ŝarĝojn niajn tie ĉi.  
Tial ilin ni demetu  
ĉiujn preĝe nur ĉe vi.  
Baldaŭ preĝoj ne necesos  
ĉe la brila tron' de Di'.  
Ĝis etern' ni restos rave  
en ador' kaj laŭd' al Li.

...

Joseph M. Scriven ,  
Ho Jesu', amiko  
mia

*tradukita de Manfredo Ra-  
tislavo*

Ho Jesu', amiko mia,  
Kiel alta estas vi!  
Estas vi peranto nia,  
Kiu ligas nin kun Di'.  
Kiom da aflikto devas  
Nenecese porti ni,  
Se preĝante, Lin serĉante  
Ni ne turnas nin al Li.

Kiam la diablo tentas  
Nin kun ega energi',  
Ni ne devas timi ion,  
Se kredeme preĝas ni.  
Jen montriĝas la fidelo  
De Jesu', nin helpas Li,  
Kiel la Savant' potenca.  
Tiun preĝe petu ni.

Se ni estas zorgoplenaj  
Kaj nin premas tio ĉi,  
Certe helpas nin Jesuo,  
Niajn preĝojn aŭdas Li.  
Se amikoj vin forlasas,  
Diru tion nur al Li!  
Li vin ŝirmos kaj konsolos.  
Nur al Li vin turnu vi.

Ho Savanto, Vi promesis,  
Ke Vi portos ja por ni  
Niajn ŝarĝojn, ni do portu  
Ĉion preĝe nur al vi.  
Baldaŭ ni ne devos preĝi  
Plu sur tiu Tero ĉi,  
Tie ni senfine gloros  
Vin en eternec', ho Di'.

...

Joseph M. Scriven ,  
What a Friend We Have  
in Jesus

What a friend we have in Jesus,  
All our sins and griefs to bear!  
What a privilege to carry  
Ev'rything to God in prayer!  
Oh, what peace we often forfeit,  
Oh, what needless pain we bear,  
All because we do not carry  
Ev'rything to God in prayer!

Have we trials and temptations?  
Is there trouble anywhere?  
We should never be discouraged,  
Take it to the Lord in prayer:  
Can we find a friend so faithful  
Who will all our sorrows share?  
Jesus knows our ev'ry weakness,  
Take it to the Lord in prayer.

Are we weak and heavy laden,  
Cumbered with a load of care?  
Precious Savior, still our refuge;  
Take it to the Lord in prayer:  
Do thy friends despise, forsake thee?  
Take it to the Lord in prayer;  
In His arms He'll take and shield thee;  
Thou wilt find a solace there.

Blessed Savior, Thou hast promised  
Thou wilt all our burdens bear  
May we ever, Lord, be bringing  
All to Thee in earnest prayer.  
Soon in glory bright unclouded  
There will be no need for prayer  
Rapture, praise and endless worship  
Will be our sweet portion there.

...

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en Esperanton de Reinhard Pflüger en 2006-08.*

*Arg-372-732 (2008-03-30 23:14:41)*

*Tiu ĉi Esperantigo aperis en la numero 4/2006 de la organo de Kristana Esperantoligo (KELI), en Aŭgusto de 2006.*

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-08-24.*

*MR-449-1b / Arg-372-727 (2006-08-24 09:22:30)*

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886).*

*Arg-372-726 (2006-08-25 15:58:11)*

*Tiun originan tekston de la kanto mi trovis en la interreto en / Diesen Urtext des Liedes fand ich im Internetz unter: <http://www.cyberhymnal.org/html/w/a/f/wafwhij.htm>.*